

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 09/01/2019 Kvarcentseksdeka eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **772,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **287,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **263,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **222,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro.102



La Adjekto povas esti **1e.** Nominativa Adverbo: "Ni kuris RAPIDE". **2e.** Adjekto Akuzativa pro forlaso de prepozicio: "Ni venos LUNDON" kaj "Ni promenis LA TUTAN MATENON". **3e.** Prepozitivo kun aŭ sen akuzativo: "Ni promenis EN LA ĜARDENO kaj poste iris EN LA DOMON", do kaŝita prepozitivo. **4e.** Infinitivo: "Ili venis KARTLUDI". **5e.** Prepozitiva Infinitivo: "Ili venis POR KARTLUDI".



Kiel menciita, Adjekto povas sed ne devas esti en la frazo. Normale la Adjektoj troviĝas en la frazo post la aliaj tri partoj: "Ili manĝis la vespermanĝon EN LA ĜARDENO", sed, pro stilo, oni metas unu el la

Adjektoj en la komencon de la frazo: "DUM LA VARMEGA TAGO ni restis EN LA DOMO". Malofte aliloke: "Ni ĈIUTAGE iris FRUE aĉeti la ĵurnalon".

Marcel Leereveld.



La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo

atendos vin.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

La 4a de Januaro estis la unua sabato de la jaro. Venis Rainer, Roger, John, Michael kaj Chris **Roger Springer**



Ness Claus



Ni bedaŭrinde ekkonis ke je la 4-a de Januaro 2020, ni perdis tre amitan konatinon kaj amikon, Ness Claus, 97

jarojn aĝa. Ŝi estis longtempa Esperantistino kaj ŝi kune kun sia edzo, Erhard, estis ĉiam tre bonvenaj ĉeestantoj ĉe la Brisbana Esperanto Societo. Ŝi estis ĉiam tre afabla, kaj partoprenis ĝis la fino en la vivo de la Societo. Ŝi ankaŭ havis la distingon de la konado de tri internaciaj lingvoj, nome la angla, la latina, kaj Esperanto.

Niajn kondolencojn ni kore sendas al ŝia ĉarma edzo, Erhard, ŝia familio kaj amikoj.



Ŝian mankon ni sentos.

Peter Danzer



Kara Ness Claus en la meza kun edzo, Erhard. Maldekstre: Linda

BRISBANA ESPERANTO - SOCIETO
 Kunvenas la duan sabaton ĉiumonate,
 13.30 ĝis 16.00 horo, ĉambro 1.9
 Brisbane Square Biblioteko, Adelaide St.

Vizitantoj estas bonvenaj





(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

? SI MEM KRITIKATAS DE MIA ĜARDENO ?

Kvankam ege malofte uzata, observu la ŝanĝon el de Aktiva Voĉo al Pasiva Voĉo (kaj eĉ Mediala Voĉo) de Refleksiva frazo, ekzemple “La knabo lavas sin mem” kaj “La knabo lavas sian vizaĝon”. Ĉar en Refleksa Frazo la Refleksiva Pronomo ĉiam ripetas la Subjekton de la ago, oni ne povas, en la Pasivo, translokigi ĝin al la nova Subjekto, kion oni normale faras pri la Objekto. Sekve oni devas meti ĝin en la novan de-adjekton (aŭ forlasi ĝin) jene: “Li (aŭ “La knabo”) lavatas de si mem” kaj “Lia vizaĝo (aŭ “de la knabo”) lavatas de ii (aŭ “de la knabo). Sed mi konsilas ne uzi tiajn nebezonatajn strangajn transformojn per Voĉoj. **Marcel.**



KARA SPERTA BOB !

Mi ĝojas pro cialj bonaĵoj, eĉ bonegaĵoj, sed mi malĝojas pro cia eraro, nomita “Mi vidis ŝin kun ridindan ĉapelon sur la kapo”. La prepozicio ne povas ne aparteni al la resto de la prepozitivo, do “kun ridinda ĉapelo”, ĉar ci lernis antaŭ multegaj jaroj, ke post “kun” oni ne uzas akuzativon. Aŭ se oni povas uzi akuzativon kun “kun”, kiel kelkaj eble ĝuste diras, la signifo estos “al kun”, do ke ci aŭ ŝi vidis iun irantan al esti kune kun iu. Sed en ĉi tiu frazo ĉi tio estus sensencaĵo ĉar ŝi ne povas iri al sia ĉapelo estanta sur ŝia kapo. Do ĉi tie, anstataŭ amuzaĵo ci alportis sensencaĵon. sensenc

En “Mi vidis ŝin kun ridinda ĉapelo sur la kapo” unu el ambaŭ, ci aŭ ŝi, teorie povas havi la ridindan ĉapelon sur la ridinda kapo, sed normale, kaj ci ofte estas normala, oni metas la prepoziti-von tuj post ĝian antecedenton, aŭ faras ion alian. Do aŭ “Mi kun ridinda ĉapelo sur la kapo vidis ŝin” aŭ “Mi vidis ŝin kun ridinda ĉapelo sur mia kapo”, se estas ci kiu surhavas la ĉapelon.

Pri cialj aliaj neamuzaĵoj: “Mi aŭdis ŝin klarigantan etan problemon al la fileto”: “klarigantan” povas esti nur parto de la tuta Objekto, ĉar ĝi havas la Objektan akuzativon; kaj “klarigantan” ĉi tie signifas tiam “kiu klarigis”. Ankaŭ eblas “klariganta”, kio ĉi tie tiam signifas “dum ŝi klarigis”. En B. “klarigante” povas signifi nur ke ci klarigis, ĉar adverbo difinas verbon kun sia Subjekto.

Ne timu superŝuti min per lingvaj problemoj, ĉar solvi ilin ĉiujn estas mia devo.

Marcel Leereveld.

KARA VERE !

Mi ne scias, ĉu ci verkis ĉi tiun “anekdoteton” lude por povi mencii vian tre deziratan voluptemon, aŭ ĉu ci vere trovas la vorton “bezonatas” stranga.

Mi komentas kvazaŭ ĝi ne estas vortludo cia, kaj ke ci vere konfuzatis de la vorto. Jen do:

Pro la bezono havi specialan sufikson por krei la bezonatan Verban Pasivan Voĉon, mi antaŭ pli ol dudek jaroj oficiale kreis kaj anoncis la sufikson “-ati” por tiu celo, KONDIĈE KE ĜI ESTU UZATA NUR KIEL VERBO, KAJ KONDIĈE KE EL ĜIAJ DU SIGNIFEROJ DE TEMPO

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

KAJ PASIVECO ĜI PERDAS SIAN TEMPAN SIGNIFON KAJ RETENAS NUR SIAN SIGNIFON DE PASIVECO. (la tempa signifo troviĝas tiel nur en la finaĵoj –as, -is, -os, -us, -u, kaj -i). MI RAJTIS APLIKI ĈI TIUN SIGNIFOREDUKTON ĈAR ANKAŬ ZAMENHOF APLIKIS PLURFOJE ĈI TIUN “SIGNIFOREDUKTON” (ekz. “int kaj ant kaj ont retenas nur sian signifon de “persono” kiam (kaj nur kiam!) ĝi havas la substantivan kategorion “-o”). Konsekvence la finaĵo “-ati” (kaj nur en verba formo!) povas uzati nur en la reduktita signifo de pasiveco. Depost tiam la vorto “bezonatas” signifas nur la malnovan ekvivalenton “estas bezonata” (kaj plue ekzistas bezonatis kaj bezonatos k.t.p).

Se tio ne estis la Fundament’eca celo de PReVo, “bezonatas” estas la malnova (kvankam neniam uzata) verbigo de “estas ankoraŭ nefinita esti bezonata”, en la malnova Zamenhof’a uzado. **Marcel Leereveld.**

MEMKRITIKOJ KUN SIAJ REFUTOJ .

Ĉar ne ensendatis kritikoj al miaj tezoj pri la participo, mi mencias kelkajn eblajn.

1). Almenaŭ en Eŭropo estas Esperantistoj kiuj diras al mi “Ci povas esti prava pri la gravaj eraroj en la participa gramatiko de Esperanto, sed ĉiu estas al kutimiĝinta al ili, ne rimarkas ilin, kaj bone sin komprenigas malgraŭ ili. Do estas sensenca ripari ilin nun por havi perfektan lingvon.” Mi agnoskas, ke la korektado kreas kelkajn problemojn, precipe la iometa ŝanĝado de la lernolibroj. Sed unue la ŝanĝoj ne bezonas farati tuj, kaj koncernas nur tre malgrandan parton de la tuta gramatiko. La malnova literaturo restos tute komprenebla, do oni apenaŭ rimarkos la ŝanĝon. Kaj laŭ mi la neŝanĝado rezultus en pli gravajn problemojn, nome ke ni uzados la gramatikon kelkparte mallogike kaj malĝuste, kaj ke novaj lernantoj scios tion, ĉar ni ne povas teni tion sekreta, kaj ili malpli admiros nian lingvon. Krome ni ne povos, en nia reklamado, aserti ke Esperanto estas perfekta lingvo, perfekta por esti interlingvo. Ankaŭ la ne-Esperantuloj kaj kontraŭ—Esperantistoj ekscios niajn mankojn, kaj uzos tiun scion por kontraŭagi niajn penojn por akceptindigi Esperanton ĉe oficialaj instancoj, i.a. registaroj kaj la Unuiĝintaj Nacioj.

2). Mi uzadas la diferencon gramatikan inter “*a work*” kaj “*to work*” por akceptindigi la gramatikan diferencon inter la participo kun tempa signifo kaj la sama participa vorto kun nur pasiva signifo. Do ke ekzistas du apartaj participoj “*sent*” en la angla kaj “*envoyé*” en la franca. Pluraj eŭropanoj asertas, ke oni ne rajtas egaligi tion ĉar ĉe “*a work*” kaj “*to work*” la vortetoj “*a*” kaj “*to*” restas apartaj vortoj, sendependaj, de “*work*”, dum ĉe la participoj la helpverboj “*is*” kaj “*has*” komplete kunfandiĝas en signifon kun la participo, ekz. “*has received*” (= Perfekto) kaj “*was received*” (= Pasiva Preterito). Mi kontestas tiujn motivojn, ĉar ankaŭ “*a work*” kaj “*to work*” komplete integriĝis, kiel en la Esperanta “laboro = iu laboro” kaj en la angla “*to work*” unuiĝas al “*work*” kiel helpverbo. Kaj ĉe la participoj oni klare daŭrigas distingi inter “helpverbo” kaj participo kaj inter t.n. prezenta participo kaj pasinta participo. Do ne ekzistas iu ajn tialo por ne trakti la participon “*sent*” kiel du participojn, unu kun aktiva kaj pasinttempa signifo (*has sent*) kaj alia kun nur pasiva signifo (*was sent*) sen indiko de tempo.

3). Kelkaj diros: Dum en eŭropaj lingvoj la formo de la Perfekta Tempo povas indiki la signifon aŭ de la Perfekta Tempo aŭ de la Preterita Tempo, la eŭropaj parolantoj sentas

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

aŭtomate kiun signifon atribui al la formo de la Perfekta Tempo, kaj do ankaŭ la Esperantistoj povos fari tion en Esperanto. Tio ne pravas, ĉar la Esperantistoj de tiuj lingvoj kiuj ne ŝanĝadas sian Preteritan Tempon kaj tiuj kiuj ne havas Perfektan Tempon ne aŭtomate sentas la signifon el la du.

4). Pluraj diras, ke mi malpravas se mi diras ke en "It was found at six o'clock" "found" ne indikas tempon. Ili asertas ke en la kombinaĵo "was found" la vorto "was" transdonas sian Preteriton parte al la participo. Eĉ se tio estas vera, kion mi ne kredas, kio okazas en la Prezenco kaj en la Futuro? Tie nek "is" (being)" nek "will be" transdonas al "found" iun ajn tempon. Nur en la Prezenco kaj en la Futuro la Participo "found" estus do Sentempa Participo. La logiko kaj la fakto estas, ke nur "was" sufiĉas por indiki la Pasintan Tempon.

5). Kelkaj asertas, ke kvankam en "It was found" "found" ne indikas la Preteriton, ni en Esperanto devas sekvi la kutimojn de la eŭropaj participoj. Se ni faras tion, SEN HAVI SPECIALAN SUFIKSON POR LA PASIVO, ni plu havos ĉiujn nunajn problemojn ligitajn al la tempoj de la Esperantaj participoj.

Jen do la necesa kaj ideala kaj perfekta sistemo de la Esperantaj Voĉoj.

STRIKTA REGULO: La bildo de la Pasiva Voĉo estas ekzakte la sama kiel la bildo de la Aktiva Voĉo, kaj ŝanĝo de vortoj neniel ŝanĝas la bildon sed nur nian manieron rigardi ĝin disvolviĝi.

STRIKTA REGULO: Nur la pasiva sufikso montras ke la frazo estas en la Pasiva Voĉo kaj ke nial rigardas la bildon el de la fino returne al la komenco.

REGULO: La nun nura Pasiva Sufikso havebla estas "-ati" kun certaj limigoj (t.e. uzebla nur kiel verbo, do kun finaĵo -as,-is,-os-us-u,-aŭ -i, kaj kun reduktita signifo de nur Pasiveco, ne tempo, kiun esprimas la finaĵoj).

STRIKTA REGULO: La tempoj estas ekzakte la samaj en ambaŭ Voĉoj (do: Oni protektis la ŝipon > La ŝipo protektatis kaj Oni ankaŭ nun ESTAS PROTEKTANTA la ŝipon > La ŝipo ESTAS ankaŭ nun PROTEKTATA).

Sed Zamenhof ŝanĝis ĉi tiun inteligentan sistemon, ĵus antaŭ ol publikigi Esperanton, al eŭropeca sistemo sen verba pasiva voĉo, kaj uzante unu tempoformon por indiki kaj signifi du malsamajn verbtempojn kaj krome uzante la formon de la Daŭra Tempo ankaŭ por la signifo de la Prezenco. Pro tio la problemoj.

Marcel Leereveld.



Ĉu nia militistaro nur defendas kontraŭ fremdaj militistaroj, sed ne kontraŭ atakoj de la naturo?

Roger Springer



3ZZZ ... En la elsendo de la 6a de Januaro vi aŭdos intervjuon de Brian Russell pri belega domo, kiu havas nekredeblan historion, Casa Masdeŭ, vizitinda en Barcelono (Hispanujo) kaj rekomendojn de UEA pri Homaj Rajtoj kaj Unuiĝintaj Nacioj.

Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE